Bob Dylon ,

Kiom da mono elspezas la hom'

tradukita de Manfred Retzlaff

Kiom da mono elspezas la hom'
Por la armilar' sur la ter'? -
Kaj kiom da vortoj diratas de li?
Kaj ne malpliiĝas mizer'!

Ĉu devos okazi la lasta milit'
Kun neimagebla mizer'?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

Kiom da stratoj sur tiu ĉi ter'
Kondukas al senesperec'? -
Kaj tiom da maroj en tiu ĉi mond'
Plenplenas de plor' kaj tristec'? -

Kaj kiom da inoj atendas, ho ve,
Kaj restas en tia solec'?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

Kiom da homoj en malliberec'
Suferas nur pro opini'? -
Kaj kiom da homaj infanoj, ho jes,
Malsatas sur ter tiu ĉi?

Kaj kial la revoj sur pac' sur al ter'
Ne efektiviĝas sur ĝi?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de BOB DYLON *(civila nomo: Robert Allen Zimmermann, ∗1941-05-24) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1984-04-29.*

MR-148-1 / Arg-720-1447 (2012-12-11 09:05:35)

La melodio de tiu ĉi kanto, kiun verkis la aŭtoro Bob Dylon (civila nomo: Robert Allen Zimmermann) ankaŭ, aŭdeblas en `http://www.youtube.com/watch?v=tGO8snK98l0`. Pri la muziknotoj vidu: `http://de.scribd.com/doc/9589786/Bob-Dylan-Blowin-in-the-wind-notes`.